

I. Lingvokonaj taskoj

Maksimumo de akireblaj poentoj: 10

Solve la subajn taskojn!

Proponita labortempo: 30 minutoj

1. Finu la vortojn!

Ĉu vi havas bon_____ geamik_____?

Maten_____ pluv_____, sed nun jam est_____ bela vetero.

2. Kio estis la demando? Faru demandojn pri la substrekitaj partoj!

1. – _____?
– Maria estas tre bela knabino.

2. – _____?
– Mi vekigis je la sesa horo.

3. – _____?
– Mi ne povis viziti vin, ĉar mi malsaniĝis.

4. – _____?
– Mi lernis multe hodiaŭ.

5. – _____?
– Dankon, mi fartas bone.

II. Skriba sinesprimo

Maksimumo de akireblaj poentoj: 20

Elektu unu el la subaj du temoj kaj skribu laŭ ĝi 13–15-linian leteron!

Via letero enhavu ĉiun postulatan informon!

Ne forgesu la formalizaĵojn de la letero (alparolo, saluto, dato, subskribo)!

Proponita labortempo: 50 minutoj

I.

Vi deziras korespondi kun eksterlandanoj, tial vi aperigis anoncon. Vi ricevis mallongan leteron el Kubo.

Respondu al tiu letero. En via respondo

- prezentu vin kaj vian familion
- skribu pri tio, kie vi laboras / studas
- prezentu mallonge vian landon kaj vian loĝlokon
- skribu pri viaj ŝatokupoj
- demandu tion, kio interesas vin pri via nova korespondamik(in)o.

AŬ:

II.

Skribu leteron al via amik(in)o pri tio, ke via filo havis naskiĝtagon.

En via letero skribu,

- kiam kaj kie okazis la festo
- kion li petis de vi kaj kion li ricevis fine, kial
- kiujn vi invitis, kial
- kio estis la programo kaj la menuo
- kiel via familio kutimis festi vian naskiĝtagon en via infanaĝo.

III. Lega kompreno

Maksimumo de akireblaj poentoj: 20

III/A

Legu la suban tekston kaj solvu la taskon!

Maksimumo de akireblaj poentoj en tiu ĉi parto: 11

Proponita labortempo: 15 minutoj

La malkovro de la kafo

Estis foje paŝtisto en Arabio. Li ĉiutage paŝtis siajn kaprojn sur montetoj, kiuj ĉirkaŭis lian vilaĝon. Vespere li ofte babilis kun siaj amikoj parolante pri la misteroj kaj la mirindaĵoj, kiujn li renkontis en la naturo. Tamen, liaj kamaradoj endormiĝis pli frue ol li, kaj ili ĉiam lasis lin sola.

Iam li supreniris sur monteton kun siaj kaproj. Sur la supro de tiu monteto li rimarkis ĝardenon de arbetoj, kiujn li neniam vidis antaŭe. La arbetoj havis ruĝajn fruktojn. Mirinde, la kaproj manĝis la ruĝajn berojn de tiuj arbetoj, kaj post momento ili saltadis kaj diskuris.

Tiam la scivolema araba paŝtisto varmiĝis akvon kaj metis en ĝin kelkajn ruĝajn berojn. Tuj, kiam la likvaĵo varmiĝis, li gustumis... La trinkaĵo estis tre agrabla. Vespere li regalis siajn amikojn per tiu trinkaĵo. De tiam liaj amikoj ne endormiĝis frue. La arbetoj, kiuj havis ruĝajn berojn, estis kafo-arbetoj.

Tiel la kafo estis malkovrita.

Respondu mallonge, per unu-du vortoj al la demandoj!

1. Kie vivis la paŝtisto?

2. Kiajn bestojn li havis?

3. Kion la paŝtisto faradis vespere?

4. Kial li restis sola?

5. Kie li trovis la novajn arbetojn?

6. Kian koloron havis la fruktoj?

7. Kiu(j) gustumis la berojn unue?

8. Kion li aldonis al la fruktoj por fari trinkaĵon?

9. Kian guston havis la trinkaĵo?

10. Al kiu li proponis tiun trinkaĵon?

11. Kiel oni nomas tiujn arbetojn?

III/B

Legu la suban tekston kaj solvu la taskon!

Maksimumo de akireblaj poentoj en tiu ĉi parto: 9

Proponita labortempo: 25 minutoj

Miriga *Mona Lisa*

Leonardo da Vinĉi estis 51-jara kiam li ekpentris la 24-jaran junulinon *Mona Lisa* en 1503. La juna virino kutimis viziti la pentrejon de la majstro kiam ekmallumiĝis ekstere. La artisto laboris dum tri jaroj por fari la bildon kaj la junulino pli kaj pli interesis lin. Pro tio li ne emis vendi la pentraĵon al Francisko, la edzo de *Mona Lisa*. Li diris, ke ĝi ne estas ankoraŭ tute preta.

La bildon de *Mona Lisa* Leonardo da Vinĉi kunportis al ĉiuj lokoj, kie li loĝis: Milano, Romo kaj finfine al Francio, kie li ekloĝis en 1516. Reĝo Francisko la unua donacis al Leonardo belan kastelon ĉe la rivero Luaro. La reĝo volis aĉeti la pentraĵon kontraŭ 4000 oraj moneroj, sed li ricevis ĝin nur post la morto de la artisto.

La pentraĵo poste apartenis al reĝoj kaj imperiestroj de Francio. Oni prezentis ĝin en la famaj kasteloj Fontaneblo, Versajlo kaj en Tuilerioj. Ĝi beligis ankaŭ la dormoĉambron de Napoleono Bonaparte.

La pentraĵo forlasis Francion nur dufoje. La unua fojo okazis en 1911, kiam iu ŝtelis ĝin. Oni retrovis ĝin finfine en Italio du jarojn poste. La duan fojon oni prezentis ĝin en Usono dum 26 tagoj laŭ la peto de prezidento *Kennedy*. Dum la vojaĝo oni senĉese zorgadis pri ĝi. Neniam en la historio de arto oni asekuris pentraĵon por tiom da mono.

Hodiaŭ la fama pentraĵo troviĝas en Parizo, en la plej granda muzeo de la mondo, Luvro. Ĝi estas konata, kiel iama palaco de reĝoj de Francio. Ĝi estas ne nur la muzeo de la tuta Francio, sed ankaŭ internacia muzeo, kiu enhavas egiptajn, grekajn, romiajn kaj etruskajn trezorojn. Necesas pli ol tri tagoj por viziti Luvron, kiu povas akcepti samtempe 4000 vizitantojn.

Decidu surbaze de la teksto, ĉu la asertoj estas veraj aŭ falsaj!

	Vera	Falsa
1. Leonardo estis nur 24 jara, kiam li komencis pentri la bildon pri <i>Mona Lisa</i> .		
2. <i>Mona Lisa</i> iradis al la pentristo, kiam komencis vesperiĝi.		
3. La edzo ĉiam diris, ke la pentraĵo ne estas tute preta.		
4. Leonardo ricevis de la franca reĝo kastelon.		
5. Fine li vendis la pentraĵon kontraŭ 4000 oraj moneroj al la franca reĝo.		
6. Napoleono dekoraciis per la bildo sian dormoĉambron.		
7. La prezidento <i>Kennedy</i> petis, ke oni portu la bildon al Usono.		
8. Dum la vojaĝo al Usono iu ŝtelis la pentraĵon.		
9. Por rigardi la trezorojn de Luvro, oni devas pasigi tie minimume tri tagojn.		